

# BULTENO

GERMANA  
ESPERANTA  
FERVOJISTA  
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung  
deutscher Eisenbahner-Esperantisten  
im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Augusto/Septembro/Oktobro 1973

## Jarkunveno 1973 en Koblenz




Foto: Fremdenverkehrsamt

### Koblenz „Deutsches Eck“

Kie la rivero Moselo enfluas en la rive-  
regon Rejnon, tie situas Koblenz, la urbo  
kun 2000jara historio. Tie okazos inter la  
5a kaj 7a de Oktobro 1973 la tradicia jar-  
kunveno de nia landa asocio, al kiu vi  
estas kore invitata.

Post la sukcesplena jarkunveno 1972 en  
Clervaux/Luksemburgo kune kun aliaj

landaj asocioj GEFA okazigos denove  
sian apartan kunvenon. Tiujare Koblenz  
estos la gastiganta urbo. Granda estas la  
salto de preskaŭ du jarmiloj inter la grava  
milita bastiono de la romia imperio ĝis la  
nuntempa moderna rejnlanda metropolo.  
El „Confluentia“ fariĝis la nuna nomo. En  
la kvina jarcento la romiaj legionoj re-



gresis. La Frankoj aperis sur la historia scenejo. Ili starigis la frankonian reĝan palatinon. Depost 1018 Koblenz estas submetita al la regado de la ĉefepiskopo de Trier. Dum la sekvaj ok jarcentoj la urbo ekfloris kiel komerca kaj ekonomia centro. Por defendi sin kontraŭ diverslandaj agresoroj estas konstruita jam en la 12a jarcento la giganta fortikaĵo Ehrenbreitstein, nuntempe nur vidindaĵo, kun belega panoramo super la valoj de la riveroj Rejno kaj Moselo.

Bedaŭrinde la vivo de la urbo estas markita ankaŭ per malfeliĉaj eventoj. Sinsekvis bruligoj, kvereloj, infektoj kaj ofte sangaj militoj. En la 17a jarcento, dum la 30jara milito, la enloĝantoj devis suferi la turmentojn per hispanaj, svedaj, francaj kaj imperiestraj trupoj. Post la unua kaj dua mondmilito Koblenz estas okupita de la Francoj.

Sekve da la franca revolucio finiĝis en 1814 la regado de la princepiskopoj. Laŭ la decido de la kongreso en Vieno (1815) la urbo Koblenz estas atribuita al la provinco Prusio. Depost 1945 ĝi apartenas al Rejnlando-Palatinato.

Malgraŭ imensaj detruoj dum la dua mondmilito la enloĝantoj konservis sian persistan volon kaj la reĝnan sentimon, kiu esprimiĝas en gaja gastameco. Koblenz fariĝis denove grava ekonomia kaj administra centro. Situenta enmeze de la plej granda viteja regiono la urbo evoluis intertempe kiel elstara vendoloko por vinoj. La damaĝoj sekve de la milito ne plu ekzistas. Koblenz prezentas ankoraŭ malnovajn vidindaĵojn, sed ankaŭ havas modernan aspekton.

Multaj turistoj eluzas la okazon por viziti tiun unikan urbon ĉe du riveroj. Ili ankaŭ frekventas la tri kilometrojn longan pro-

menvojon laŭlonge de la riverego Rejno, sur kiu unu pasaĝera aŭ vara ŝipo sekvas la alian. Dum la somera sezono abundas je allogaj aranĝoj ekz. iluminado, koncertoj, defiladoj, folkloraj festoj. Sed ankaŭ dum Oktobro, kiam okazos la jarkunveno, estas malferma la fama vinvilaĝo, centro de reĝna kaj mosela gajeco. Tie oni ĝuu la mondfamajn vinojn. Ĉiuvespere okazas distraĵoj kaj dancado.

Ne mirinde, ke la organizantoj atendas multnombrajn kongresanojn, en- kaj eksterlandajn. En la belega Rejno-Moselohalo prezentiĝos alloga programo. Do, eluzu la okazon por kombini esperantistan sferon kun rejnlanda gajeco. Vi estas kore bonvenaj!

W. B.

### **GEFA-Jahreshauptversammlung in Koblenz**

Diesem Bulteno liegt der Anmeldevordruck für die diesjährige Jahresversammlung vom 5. - 7. Oktober bei. Wir bitten, den Abschnitt abzutrennen und bis zum 15. 9. 1973 an die angegebene Anschrift ausgefüllt zurückzusenden.

Über den Ablauf der 17. GEFA-Jahresversammlung unterrichtet Sie das vorläufige Programm, das Sie ebenfalls auf der Anlage zum Bulteno finden.

Nach dem Besuch des Empfangsbüros in der Bahnhofshalle empfehlen wir, Ihr Hotel aufzusuchen. Die Anschrift wird Ihnen das Fremdenverkehrsamt Koblenz rechtzeitig mitteilen, wenn Sie ihre Zimmerbestellung bis zum 1. 9. 1973 abgesandt haben. Die Bestellkarte wurde Ihnen bereits mit Bulteno 4/73 überreicht. Nachforderungen bei den Bba sind möglich.

GEFA-Mitglieder mit Angehörigen und Bekannten sowie unsere ausländischen Freunde sind herzlich eingeladen.

### **Münster/Westfalia kaj Osnabrück**

Bedaŭrinde staris nia ĉi-jara majo-ekskurso sub malbona stelo. Jam kiam ni ekmarŝis — ĉi-jare ni migris en la bela suda ĉirkaŭaĵo de Osnabrück — la ĉielo estis griza. Ĉiam ni esperis, ke ĝi heliĝis, sed el kelkaj gutoj, kiuj falis unue, fariĝis pluroj.

Estis interesa regiono, tra kiu ni migris. Ne nur laŭ la historio, ĉar kelkaj restaĵoj ankoraŭ memorigas nin pri

la tempo de la imperiestro Karlo, la Grandulo, sed ankaŭ laŭ la geologio. Ĉi-tie oni trovis feron, kiu estis la kaŭzo por la fondo de la „Georgsmarienhütte“ ĉe Osnabrück, kiu apartenas al la Klöckner-koncerno.

Finfine ni atingis la restaŭracion Jägerberg ĉe la „argenta lago“. Pro tio ke la pluvo ne ĉesis, ni restis sufiĉe longe en la restaŭracio. Estas nia devo, danki ĉi-tie s-ron Holtmann el Osnabrück, kiu transportis nin

per sia aŭtomobilo reen al la stadiono en Osnabrück. Tamen ni estis kontentaj, ĉar ni estis eĉ en internacia rondo kun partoprenintoj el Jugoslavio kaj Nederlando. Ankaŭ junuloj partoprenis.

### **Anonco**

Filatelisto deziras kontakton kun germanaj gekolegoj. Adreso: S-ro Lujo Staniĉić, Zeleni Dol BR. 19, You-41 000 Zagreb/Jugoslavio



**Die Delegierten des 25. Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongresses haben folgende Resolution einstimmig gebilligt:**

## Kongreßresolution

Der 25. Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes (IFEFF), an dem 502 Personen aus 18 Ländern teilnahmen, der den Japanischen Eisenbahner-Esperanto-Bund als 20. Landesverband aufnahm, und der seine Aufmerksamkeit besonders auf das Sprachenchaos in der Europäischen Gemeinschaft, im internationalen Tourismus und in allen Arten von Verkehr richtete,

**stellt fest**, daß touristische wie auch Geschäftsreisende der Eisenbahnen, des wichtigsten Massenverkehrsmittels, genauso wie die im Dienst stehenden Eisenbahner selbst, dauernd und überall Sprachschranken antreffen, die Kontakte zu Einwohnern anderer Länder verhin-

## So sehen uns andere

Wir veröffentlichen hierunter ohne Kommentar auszugsweise zwei Schreiben der Leitungen der GdED und der GDBA an ihre nachgeordneten Stellen.

**Gewerkschaft der Eisenbahner Deutschlands Frankfurt (Main), Hauptabteilung Organisation**  
19. 4. 1973

An alle  
Ortsverwaltungen, Bezirksleitungen

Liebe Kollegen!

Von dem Verband Deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW wurden wir gebeten, eine Mitgliederwerbung zu unterstützen. Wir brauchen nicht besonders zu betonen, das unsere Organisation die Bestrebungen der Esperantisten in Zusammenarbeit mit dem BSW unterstützt und es begrüßen würde, wenn möglichst viele GdED-Mitglieder sich entscheiden könnten, in dem genannten Verband mitzuarbeiten und Mitglied zu werden.

Von dem Verband deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW erhielten wir eine Werbepschrift mit der Bitte, sie über unsere Ortsverwaltungen, vor allem an unsere Jugendgruppen, weiterzugeben. Mit einem Nachrichtendienst, der über die Ortsverwaltungen verteilt wird, werden wir in Kürze eine kleine Auflage der Werbepschrift übergeben.

dern und die erwünschte und notwendige Annäherung der Völker in Europa und der ganzen Welt bremsen,

**macht darauf aufmerksam**, daß Simultanübersetzungen bei gewissen Gelegenheiten zwar nützlich sein mögen, aber in keiner Weise beim grenzüberschreitenden Verkehr helfen,

**ist der Auffassung**, daß deshalb die Eisenbahn-Verwaltungen das größte Interesse daran haben müßten, die Sprachschwierigkeiten so vollständig wie möglich abzubauen,

**schlägt vor**, für den internationalen Verkehr die neutrale, seit Jahrzehnten erprobte internationale Sprache ESPERANTO allgemein anzuwenden,

**ersucht** die Eisenbahnverwaltungen und touristischen Organisationen, eine internationale Konferenz einzuberufen, um dieses nicht länger tragbare Sprachenproblem zu untersuchen und zu lösen.

Wir wären unseren Ortsverwaltungen sehr dankbar, wenn neben der Verteilung auch gleichzeitig zusätzliche mündliche Informationen über die Bedeutung und den Wert von Esperanto vermittelt würden.

Frankfurt (Main), 28. 3. 1973

**Gewerkschaft Deutscher Bundesbahnbeamten und Anwärter im Deutschen Beamtenbund, Bundesvorstand**

An alle  
Bezirke und Ortsgruppen

Sehr geehrte Kolleginnen, sehr geehrte Kollegen.

Zwischen der „Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW“ und der GDBA besteht seit vielen Jahren ein freundschaftliches Verhältnis. Die gute Zusammenarbeit hat sich bewährt und wesentlich zur gegenseitigen Verständigung der Eisenbahner beigetragen. Die GDBA begrüßt deshalb die Bemühungen der Vereinigung, die Eisenbahner für die Weltsprache „Esperanto“ noch stärker zu interessieren. Die Vereinigung hat uns Druckstücke ihres Mitteilungsblattes „Bulteno“ mit der Bitte um Weiterleitung an unsere Mitglieder übersandt. Wir wären Ihnen dankbar, wenn Sie interessierten Kolleginnen und Kollegen ein Exemplar aushändigen und für die Vereinigung werben würden.



## Aus den Gruppen

### Frankfurt/Main — Offenbach

Die Esperanto-Gruppe Offenbach/Main erfuhr durch die Aufnahme der beiden jungen Esperantofreunde Robert Kvasnak (USA) und Tom Christoffersen (Norwegen) eine wertvolle Bereicherung. Unser verdientes Mitglied Otto Denk leitet einen Anfängerkurs an der Volkshochschule. Seiner Initiative ist es zu verdanken, daß die städtische Bibliothek Lehrbücher und Esperanto-Literatur ihren Lesern anbietet. Der Magistrat der Stadt Offenbach sucht Lösungen zur Überwindung sprachlicher Schwierigkeiten mit seinen Partnerstädten in Belgien, England, Jugoslawien, Luxemburg und den Niederlanden. Weitere Partnerschaften mit Städten



Honoraj gastoj en Offenbach/Main dum ROMOLO-tago

in Israel, Rumänien und der Sowjetunion werden hoffentlich bald folgen. Die Esperanto-Gruppe hat bereits Kontakte mit den Esperantisten der betreffenden

Städte aufgenommen, um ihrerseits die Beziehungen zwischen den Menschen zu verbessern und diese Aufgabe nicht nur den Behörden zu überlassen.


### Esperanto-veteranoj

La plej maljuna kaj tre aktiva membro en la distrikto Wuppertal estas

#### Peter Hermanns

58 Hagen-Vorhalle, Nöhstr. 35, naskita la 7an de Julio 1901 en Serm (nun Duisburg).

Post la unua mondmilito li la unuan fojon aŭdis pri Esperanto en la sindikata gazeto „Baustein“. Dum la vintro 1929/1930 li eklernis la Internacian Lingvon en la grupo Duisburg-Hochfeld de la „Germana Laborista-Esperanto-Asocio“. Pere de anonco en „Sennaciulo“ li ekhavis kiel la unuan eksterlandan korespondantinon studentinon el Barnaul (Siberio). En Aŭgusto 1930 li vizitis sian korespondanton, laboriston en la urba elektrejo en Moskvo.



Peter Hermanns

Post la reveno li fondis Esperanto-grupon de „Laborista Esperanto-Asocio“ ankaŭ en Duisburg-Wedau kaj aranĝis kursojn por komencantoj. La intereso pri Esperanto estis tiutempe tre

granda, ofte la kursoj havis pli ol 30 gekursanojn.

Kiam en la jaro 1933 komenciĝis la „Miljara-Reĝno“, nature ĉio estis pasinta! Poŝt la dua mondmilito nur en la jaro 1948 li kontaktis kun kolego Waldmann (iama distrikt-komisiito en Essen) en Recklinghausen. Li fariĝis membro de „Germana Esperanta Fervojista Asocio“ kaj „Internacia Fervojista Esperanto-Federacio“, aranĝis kursojn por komencantoj ankaŭ en Duisburg-Wedau. Pli poste li fariĝis membro de la „Universala Esperanto-Asocio“, post kelkaj jaroj ankaŭ delegito kaj fakdelegito fervojista. En tiu tempo la intereso pri Esperanto inter la fervojistoj estis ankorau granda.

Post la emerito en la jaro 1966 Peter Hermanns trans-



loĝiĝis al Hagen (Vestfalia). Ĉi-tie li kunigis la unuopulojn kaj fondis kune kun ili la „BSW-Esperanto-Grupon Hagen“. Al tiu grupo nun ankaŭ apartenas kelkaj nefervojistoj. La plej ĝojigita rezulto de lia laboro estis en Aprilo 1972 la vizito de la ambasadoro de Aŭstralio, s-ro Ralph Harry, en Hagen. Kune kun la edzino, kiu en la jaro 1931 partoprenis lian kurson li vizitis intertempe 15 IFEF-kongresojn kaj esperas ĉeesti la sekvan en Hispanio.

## Aranĝoj

### Konferenco de la fervojista sekcio de ĉeĥa Esperanto-asocio Praha

Kore invitas niaj ĉeĥaj najbaroj partopreni la jarkunvenon en Plzen (Pilsen) inter la 14a kaj la 17a de Septembro 1973. Krom komitatokunsido estas programita trajnekskurso al kastelo Kozel kaj ekskursoj al lokomotivfabriko Škoda kaj bierfabriko Pilsner Urquell kun gustumado. Ĉu vi havas intereson kaj tempon skribi al „Fervojista Sekcio de ĈEA“ kun sidejo en Česká Třebova. Limdato por aliĝilo estas la 1a de Septembro 1973.

**Luxemburg** — Während des kürzlich in Luxemburg stattgefundenen Europäischen Esperanto-Kongresses wurde ein Europäisches Esperanto-Zentrum für die Länder des Gemeinsamen Marktes ins Leben gerufen. Leiter des Zentrums wurde der Belgier Dr. P. Denoel, Lüttich. Das Zentrum soll konkrete Aufgaben zur Einführung der internationalen Sprache Esperanto bei der Europäischen Gemeinschaft durchführen. Zu diesem Zweck wird ein Informationszentrum unter der Leitung von Dr. G. F. Makkink, Niederlande, eingerichtet.

## Nekrologo

En la aĝo de 78 jaroj mortis la 6an de Julio 1973 nia membro

### Leo Bald

el Frankfurt. La Internacia Lingvon li praktikis jam de pli ol 40 jaroj. En la riparejo Frankfurt-Nied, kie li laboris, li kunfondis aktivan Esperanto-grupon. Multaj eksterlandaj amikoj ĝuis lian gastamecon, samkiel Leo Bald ofte partoprenis internaciajn kongresojn aŭ vojaĝis kiel naturamiko al aliaj landoj. Nia asocio sincere kondolencas al lia vidvino.



Leo Bald

En aĝo de 66 jaroj forlasis nin tute subite kaj tro frue la 14-an de Majo 1973 nia fidela membro en Nürnberg

### Otto Rosenzweig


Li partoprenis IFEF-kongreson en Lugano 1972 kaj intencis viziti la jubilean kongreson en Aarhus, bedaŭrinde ne ebligis.

Post mallonga malsano li nun trovis eternan ripozon. GEFA funebras kun la familio, al kiu ni sincere kondolencas.

GEFA-estraro

## Komisiito por junlaraferoj kaj kromkomitatano de IFEF

La unuan kontakton kun Esperanto mi havis hejme, kiam eksterlandaj geamikoj vizitis miajn gepatrojn. Post kiam mi komencis mian servon ĉe la fervojo, la tiama komisiito de la junularo, G. Doliwa, invitis min partopreni la skisemajon en Werfenweng. Tie



Werner Heimlich

mi konstatis, kiel bona interkomprenilo Esperanto estas. En meminstruo mi nun lernis nian belan lingvon. Mi regule partoprenis la skisemajnojn kaj vizitis ankaŭ kelkajn kongresojn. Surprizo estas por mi la nomigo kiel komisiito por junularaj aferoj. Mi nun provos plenumi tiun taskon.

**Esperanto an der Universität Hamburg** — Seit einiger Zeit besteht ein Lehrauftrag für Esperanto. Lehrbeauftragter ist Dr. Werner Bormann. Ein Lehrauftrag für Esperanto besteht auch an der Universität Saarbrücken.

Redaktfino por n-ro 6/1973 estas la 10. 11. 1973.



## La fervojoj en Francio

Tio estas la titolo de la lastatempa eldonaĵo de SNCF, kiu resume prezentas la evoluon de la fervojaj aktivecoj dum la lastaj jaroj. Jen kelkaj eltiritaj informoj:

Dank'al diversaj progresoj teknikaj, la evoluo de la fervojoj dum la lastaj jaroj praktike daŭrigis la renovigan periodon postmilitan. Tuta aŭ preskaŭ tuta malapero de la vapor-trakciado simboligas la penon de rejunigo, tiel ebligante krome ek-respekti la elementajn leĝojn mediologiajn.

Alproksimiĝante al sia 150-jara jubileo la fervoj certigas renovigitan kapablecon kontentigi la bezonojn de la moderna mondo. La nova reĝimo de SNCF (aldono de la 27. I. 1971 al la konvencio de 1937) praktike donas al la fervojo: liberan administradon kaj financon respondecon, kaj ankaŭ starigas rajtegalecon inter la diversaj transportrimedoj. Kvankam granda paŝo estis farita por ĉi-tiu rajt-egaleco, multo tamen restas farota. Por trafi la celon de financa ekvilibro, SNCF ja devus havi la eblon realigi investaĵojn necesajn por kontinua plibonigo de la kvalito de siaj servoj kaj de sia produktiveco. Necesus ankaŭ, ke la ŝarĝoj postulataj fare de la ŝtato, kiel „publikaj servoj“, estu normale kompensataj al SNCF. Simpla aludo al la kompleksa trafiko tra la urbaj zonoj kaj al alia neprofitdona trafiko sur durangaj linioj, sufiĉas por komprenigi la problemon.

Efektiva nun estas la reorganizado de la diversaj servoj: 25 regionaj direktoj pli efikaj ol la antaŭaj 5 grandaj regionoj; kreado de memstara societo (SERNAM) por la transporto de la frajtpetoj; konstruado de elektronaj instalaĵoj por administrado per komputeroj de tutlanda vartrafiko kaj de tutlanda rezervigo de sidlokoj.

Krome, oni povas konstati la modernigon de la ekipaĵoj, interalie:

— **La franca reto** nun longas 35 624 km, el kiuj 9 365 km estas elektrizitaj (4 827 km per kontinu-kurento 1,5 kV, 4 299 km per altern-kurento 25 kV - 50 Hz, kaj 239 km per diversaj kurentoj). Nur 26 % de la linioj estas elektrizitaj, sed ili ebligas plenumi 78 % de la tuta trafiko. — **La trakciiloj** daŭre pliboniĝas: la kvar-kurenta tipo CC 40 000 (maks. rapido: 180 km/h) tiras la 600-tunan TEE-trajnon inter Parizo kaj Bruselo je komerca rapido 133 km/h (310 km en apenaŭ 2h20'); la nova tipo CC 6 500 (kontinukurento), kiu pezas 116 tunojn kaj povumas 8 000 ĉp-ojn, estas utiligebla ĝis 220 km/h por pasaĝer-trajno kaj ĝis 100 km/h por pezaj vartraĵoj; alia nova tipo BB 15 000 (84-tuna kun 6 000 ĉp) estas same utiligebla sur linioj elektrizitaj per altenkurento 25 kV.

La neelektrizitaj linioj, kiuj reprezentas 74 % de la tuta reto, plenumas nur 22 % de la tuta trafiko. Tamen, tie trafikaj rapidtraĵoj kaj pezaj vartraĵoj. La lokomotivo CC 72 000 (2 650 kW) estas la plej potenca dizel-elektra trakciilo de SNCF. Ekzistas ankaŭ multaj tipoj

da relaŭtobusoj kaj motorvagonoj.

Sed la plej rimarkinda trajno estas la turbinotrajno, kies sukceso montriĝis sur la linio Parizo-Caen-Cherbourg, ĉar, dank'al tiaj trajnoj la nombro de la pasaĝeroj plialtiĝis per 25 %. Oni ja atingas la urbon Caen (239 km) en 1h48' je 132,6 km/h da komerca rapido kaj la urbon Cherbourg (371 km) en 2h59' je 124,3 km/h. Tiel estis pruvite, ke SNCF povas oferti, sur neelektrizitaj linioj saman transportkvaliton kiel sur tiuj elektrizitaj. Progressive trafikos tiaj turbinotrajnoj (ĝis 200 km/h) inter Lyon-Strasbourg, Lyon-Nantes kaj Lyon-Bordeaux.

el: Esperanto Fervojisto (sekvota)

### Wieviele Menschen sprechen Esperanto?

**Nürnberg** — Die Anzahl der Esperanto-Kundigen läßt sich schwer angeben. Die Schätzungen schwanken zwischen einer und sechzehn Millionen. In der Bundesrepublik rechnet man mit 50 000 Esperanto-Sprechern. Um eine zuverlässige Statistik über die Zahl der Esperantoanhänger in der Bundesrepublik Deutschland zu bekommen, führt das Esperanto-Info-Centro Nürnberg eine Umfrageaktion durch, die sich auf mehrere Jahre erstrecken wird, um alle betreffenden Personen, die Esperanto gelernt haben und jetzt lernen, zu erfassen. Es sind 13 Fragen zu beantworten. Die Auswertung der Fragebogen wird auch eine aufschlußreiche Analyse über die praktische Verwendung der Esperanto-Sprachkenntnisse ergeben.